# HUNDO DE BLINDULO

— « *Sinjoro! Ho! Sinjoro!...* »

Mi returnis min al tiu voko ĵetita per ŝanceliĝanta voĉo kaj mi ekvidis, starantan meze de l'herbo, maljunan viron, kiu batis l'aeron per bastono.

— « *Min senkulpigu, sinjoro,* — *daŭrigis la maljunulo,* — *sed mi estas blinda, kaj de pli ol unu horo, kiam mi estas tie ĉi, vi estas la unuan, kies paŝojn sur la ŝtonoj mi aŭdis.* »

El la kvin aŭ ses stratetoj aŭ bulvardoj, kiuj, aranĝite en la malnovaj fosaĵoj, formas verdantan zonon al ruiniĝantaj remparoj, la bulvardoj de l'arenoj kun sia triobla vico de ĝibaj ulmoj, de kiuj somere pluvas grandegaj raŭpoj, kun siaj aleoj kovritaj per densa herbo, tra kiu la kutimo de maloftaj paŝantoj markis iom post iom reton de oblikvaj vojetoj — estas certe la plej dezerta.

Krom tio, la apudeco de l'tombejo allinianta tie siajn cipresojn kun malnova ruĝa dometo eksloĝejo de l'ekzekutisto, allasis al tiu kvartalo malkvietigan famon. La promenantoj evitas ĝin, preferante cetere la korektan avenuon, tute novan, kiu kondukas de la ponto al la stacio; mi do ne miris, ke la malfeliĉa blindulo, tie erarinte, longe restis, ne trovante iun por paroli. Tamen la blindulo demandis, ĉu mi konas la landon, kaj laŭ mia jesa respondo, petis, ke mi konduku lin al la trovhundejo.

La hundejo efektive ne estas malproksima, kaj mi malpravis, forgesante ĝin en l'aro da konstruaĵoj pli malpli naŭzigaj kaj malnoblaj, ordinara ornamo de niaj provincaj urboj.

Dum la irado, la blindulo rakontis al mi sian aventuron. Panserĉisto, antaŭhieraŭ, ankaŭ suferanta pro la varmo kaj elpuŝanta la langon, li havis ideon ekmalvarmigi sin en modesta drinkejo, kie oni vendas gajigan vineton, kiu havas guston de vinbero kaj ne kostas kare.

— « *Kiom ajn malriĉa oni estas, tamen oni povas soifi, kiam de l'mateno oni kuradis de kampodomo al kampodomo tra pulvoro de grandaj vojoj. Bedaŭrinde li ekdormis kaj sentaŭguloj profitis lian dormadon por distranĉi la hundan ligilon kaj forkonduki la beston. Ĉar ili fortrenis ĝin, sinjoro, fortrenis perforte: propramove la bona besto ne lasus min por ilin sekvi. Tiel bona hundo, sinjoro, Mi nomis ĝin Buriketo (azeneto) pro amikeco, kaj ĉar iafoje en niaj disputoj, kiam ĝi metis en sian kapon min konduki, kien mi ne volas iri, ĝi estas tiel obstina, kiel homo!* »

Fine la vojzorgisto vidis tri vagulojn malbone vestitajn, kun mieno de antaŭurbaj friponuloj, kiuj, ridante kiel post kulpa faro, trenis la hundon al la urbo. Kaj ĉar restinte sola, nia blindulo senesperiĝis, veturigistoj konsentis lasi lokon al li sur sia veturilo.

Ĵus alveninte, li informiĝis iom ĉie. Iu diris, ke efektive hundo terurigita, senkolĉena, ŝajne blindula hundo, vagas tra la stratoj.

Li tiel serĉis Buriketon dutage, kaj ĉar Buriketo ne retroviĝis, iu konsilis iri al la trovhundejo.

— « *Mi sciis nenion, sinjoro; oni diras, ke ĝi estas loko, kie oni enŝlosas senmastrajn hundojn. Oni mortigas ilin — ĉu vi komprenas tion? — se ili ne estas repostulitaj en dudek kvar horoj. Se nur Buriketo ne tie estus de hieraŭ! Sed Buriketo estas vigla, ĝi konas nur min; la maliculo ne lasas sin kapti tiel rapide.* »

*La blindulo marŝis ĉiam parolante, serĉante konsoli, trompi sin mem. Sed mi vidis bone, ke en fundo de l'animo li estas tre malkvieta pri sorto de Buriketo.*

*Ju pli proksimiĝis la celo, des pli lia parolado fariĝis kortuŝita, kaj li subite tute paliĝis, kiam, haltante, mi diris: « Estas tie ĉi ».*

Tiu konstruaĵo estis malgajega kaj ĝia aspekto, se li povus ĝin vidi, estus elfininta senesperigi la malfeliĉan homon; malgranda korteto antaŭ ronda turo, kiu kredeble estis